Saluton, SESanoj!

Kirikae H. skribas: Proksime al la marbordo de Oĥocka Maro estas malgranda urbo, kie mi pasigis mian infanecon dum dek jaroj (1955—1964).

En la urbo staris tri kinejoj. Urbanoj iradis al ili kaj ĝuis spekti la plej novajn filmojn. Mia infaneco hazarde koincidis la oran epokon en la historio de la japana kino. Ni povis vidi bonajn filmojn kaj famajn geaktorojn projekciitajn sur la ekranojn. La geaktoroj estis ankoraŭ junaj kaj ludis vive.

El la memorindaj geaktoroj antaŭ duonjarcento la ora duopo, Sajuri Joŝinaga kaj Micuo Hamada, ĉarmis min precipe. La duopo ĉarmadas min ankoraŭ. Iom honteme mi konfesas, ke mi estas ilia eterna adoranto. Mi posedas kelkajn foliojn da diĝitaj video-diskoj, kiuj konservas kaj reprezentas iamajn ludojn de la junaj kaj ĉarmaj geaktoroj.

La ora epoko de la urbo mem ankaŭ forpasis. Dum la nombro de la urbanoj malmultiĝis rapide, la vigleco de la urbo perdiĝis. Nur malnovaj loĝantoj memoras iaman prosperon. Maĝoje, la tri kinejoj malaperis tute.

5月5日（こどもの日）　例会はありません。